

2a DIMANĈO DE ADVENTO 8an de decembro 2013

KONVERTIĜU, ĈAR ESTAS PROKSIME LA REGNO DE LA ĈIELO

– Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 3, 1-12

En tiuj tagoj venis Johano, la Baptisto, predikante en la dezerto de Judeo. Li diris: «Konvertiĝu, ĉar estas proksime la regno de la ĉielo». Pri Li aludis la profeto Jesaja, kiam li skribis ĉi tiujn vortojn: «Voĉo de krianto en dezerto: pretigu la vojon de la Sinjoro, ebenigu liajn irejojn».

Johano havis veston el kamelaj haroj kaj ledan zonon ĉirkaŭ siaj lumboj, kaj lia nutraĵo estis akridoj kaj sovaĝa mielo. Amasoj aliris al li el Jerusalemo, el la tuta Judeo kaj el la ĉirkaŭaĵo de Jordano. Ili konfesis siajn pekojn, kaj estis baptitaj de li en la rivero.

Ankaŭ multaj el la fariseoj kaj sadukeoj venis al lia baptado. Kiam li vidis ilin, li diris: «Vipuridoj! Kiu diris al vi, ke vi eskapos de la venonta kolero? Kondutu do kiel sincere pentantaj homoj! Ne iluziiĝu dirante en vi mem: Ni estas filoj de Abraham; ĉar mi diras al vi, ke Dio povas el ĉi tiuj ŝtonoj starigi idojn al Abraham. Jam la hakilo kuŝas ĉe la radiko de la arboj; do ĉiu arbo, kiu ne donas bonan frukton, estos dehakata kaj ĵetata en fajron. Mi vin baptas nur per akvo por stimuli vin al pento; sed tiu, kiu venas post mi, vin baptos per la Sankta Spirito kaj fajro: Li estas pli potenca ol mi, kaj mi eĉ ne estas inda porti liajn ŝuojn, Lia ventumilo estas en lia mano, kaj Li purigos sian draŝejon kaj kolektos sian tritikon en la grenejon; sed la pajlon Li bruligos per fajro neestingebla».

En la peco kiun la liturgio prezentas al ni ĉi-dimanĉe estas tri vortoj kiujn gravas ekzameni ĉar se oni ne bone ilin komprenas, ili riskas havi en la vivo de la kredanto efikojn malsimilaj ol tiuj kiujn la evangeliisto volis.

La unua estas la anonco de Johano la Baptisto en la dezerto kaj temas pri imperativo: "*Konvertiĝu!*" Tiu verbo signifas ŝanĝon de mentaleco kiu implicas poste ŝanĝon de la konduto. Bedaŭrinde, pasintece, la fakto ke oni tradukis tiun ĉi inviton de Johano la Baptisto, kiun Jesuo poste igos ankaŭ la sia, per "se vi ne pentofaras", naskis la bildon de kristanismo farata el pentofaroj, oferoj, rezignoj, humiliĝoj; ĉiuj vortoj, ĉiuj terminoj, ĉiuj bildoj kiuj malestas en la lingvaĵo de Jesuo.

Neniam Jesuo en la evangelioj invitis al pentofaro. Neniam Jesuo en la evangelioj invitis la personojn humiliĝi, neniam Jesuo en la evangelioj invitis la popolon oferi, sed, eĉ, la kontraŭo! Reprenante la esprimon de Hoŝea "*Lernu kion signifas "kompaton mi volas ne oferojn"*", Jesuo ne postulas oferojn al Dio, sed la kompaton al la homoj.

La invito de Johano la Baptisto do, lia imperativo, estas "ŝanĝu vian konduton", kiu tradukiĝas per malsama orientado de propra ekzisto, ne plu pensi pri si por pensi pri la aliaj. Tiu konvertiĝo permesas la proksimecon de la Regno de la Ĉielo. Ankaŭ en tiu kazo pasintece estis iom da konfuzo, oni interpretis la Regnon de la Ĉielo kiel iun regnon en la ĉielo.

Sed ne estas tiel. Regno de la Ĉielo estas esprimo kiun utiligas nur Mateo kaj signifas la Regnon de Dio. Sed kial Mateo utiligas la esprimon "Regnon de la Ĉielo"? Ĉar li verkas por iu juda komunumo kaj zorgas ne ŝoki ĝian sentemon ĉar tiuj nek eldiras nek skribas la vorton 'Dio', sed ili utiligas ĝialoke anstataŭaĵojn.

Ĝuste kiel faras ni kiam ni diras "dank' al ĉielo", tie kiam ni celas danki Dion, la diaĵon. La Regno de la Ĉielo do ne estas iu regno en la ĉielo, ne temas pri transmondo, sed temas pri la realigo de la projekto de Dio por la homaro. Li estas la reĝo kiu regas sian popolon, li estas la patro kiu prizorgas siajn filojn.

Ĉi tiu estas la Regno de la Ĉielo, do la Regno de Dio. Kial oni diras ke tiu Regno de Dio estas proksima kaj ankoraŭ ĝi ne estas? Ĉar tiu Regno de la Ĉielo ne malsupreniras de la supro pro dia interveno, sed ĝi estas kondiĉita de la kunlaboro de la homoj per la akcepto de la beatecoj proponataj de Jesuo. Fakte Jesuo en la unua beateco proklamos beataj la

malriĉulojn en la Spirito, tiujn kiuj libere kaj propravole decidas esti malriĉaj, ĉar de ili estas...

Ne temas pri promeso por la estonto (estos), sed Estas la Regno de la Ĉielo.

En la preciza momento en kiu estas individuoj kiuj decidas orienti propran vivon al bono kaj bonfarto de la aliaj, en tiu sama momento la respondo de Dio estas ke li, kiel patro, prizorgas ilin kaj iliajn bezonojn.

Ni do vidis la vorton "konvertiĝo", ŝanĝo de mentaleco, la Regno de Dio, la realigo de la projekto de Dio por la homaro, kaj fine Johano proklamas ke li baptas en la akvo, nome li helpas ŝanĝi la vivon, sed poste la forton por komenci tiun novan vivon ne li povas doni. Ĝin donos Jesuo kiu estas indikita kiel *tiu kiu vin baptos per la Sankta Spirito*. Tio estas tiom grava ke en ĉiuj kvar evangeliistoj ni trovas la saman esprimon pri la misio de Jesuo.

Jesuo estas tiu kiu baptas per la Sankta Spirito. Se bapti en la akvo signifas mergi iun korpon en likvaĵon eksteran al la homo kiel signon de vivoŝanĝo, bapti per la Spirito signifas mergi, trempi, impregni la personon en la Spirito, tio estas en la sama forto kaj la sama vivo de Dio.

Sed kiam kaj kiel Jesuo baptas per la Sankta Spirito? La respondo estas en la evangelioj, en la momento de la vespermanĝo kun la siaj, en la momento de la eŭkaristio. Fakte dum la vespermanĝo, en kiu la disĉiploj sin devontigas esti fidelaj al Jesuo – manĝi la panon sin devontigante iĝi pano, vivnutraĵo por la aliaj, ankaŭ je la kosto finiĝi kie li finiĝos, tio signifas trinki de la kaliko – disversiĝas sur la disĉiplojn kaj sur la kredantojn de ĉiu tempo la Sankta Spirito kiu ilin igas kiel Jesuo "filoj de Dio".

La vespermanĝo de Jesuo do estas la momento en kiu li respondas al tiuj kiuj lin sekvis per la donaco de la Sankta Spirito. Fakte, trinkante de la kaliko, esprimo de la sindevontigo ne meti limojn al amo, la disĉiploj ricevas la Spiriton, la saman amoforton de la Patro.

La enigo de tiu ĉi sango-vino en la enon de la homo, estas la komuniko de la Spirito, vivo kaj amoforto kiu transformas la homon.